

**LA
PROMESO
DE
MONDA PACO**

Mesaĝo
de la Universala Domo de Justeco
al la popoloj de la mondo

La Promeso de Monda Paco

La Universala Domo de Justeco, Bahaa Mondcentro, Haifa, Israelo 1985

Esperantlingva traduko el la angla originalo *The Promise of World Peace*

Bahaa Esperanto-Ligo

Eppsteiner Str. 89, DE-65719 Hofheim-Langenhain

bel@bahai.de – www.bel.bahai.de

© Bahaa Esperanto-Ligo

Hofheim-Langenhain

Oktobero 1985

Al la popoloj de la mondo:

La granda Paco, al kiu la homoj de bona volo dum jarcentoj plenkore sopiris, kiun viziuloj kaj poetoj el sennombraj generacioj prirevis kaj kiun la sanktaj skriboj de la homaro promesis de epoko al epoko, finfine estas je la atingo de la nacioj. Unuafoje en la historio la homo havas la eblecon panorame superrigardi nian tutan planedon kun ĝiaj multaj diversaj popoloj. La monda paco estas ne nur ebla, sed neevitebla. Ĝi estas la venonta ŝtupo en la evoluo de tiu ĉi planedo — laŭ la vortoj de granda pensulo: “La planedigo de la homaro”.

Ĉu paco estu atingita nur post neimageblaj teruraĵoj kaŭzitaj de obstina persistado de la homaro ĉe arkaikaj kondukmanieroj, aŭ ĉu ĝi nun estu efektivigita per decidaj agoj surbaze de interkonsiliĝo — jen la du eblecoj, el kiuj la homoj devas elekti. En tiu kriza tempo, kiam la gravegaj problemoj sin trudantaj al la nacioj fariĝas komuna koncernaĵo por la tuta mondo, ne kontraŭbatali la tajdon de konflikto kaj malordo estus senkonscience senrespondeca.

Inter la pozitivaj signoj elstaras la ĉiam kreskanta forto de la paŝoj cele al mondordo entreprenitaj unuafoje komence de nia jarcento per la kreo de la Ligo de Nacioj, kiun sekvis sur pli larĝa bazo la Organizaĵo de Unuiĝintaj Nacioj; la akiro de sendependeco post la Dua Mondmilito atingita de la plimulto de ĉiuj nacioj sur la tero, kio indikas la finon de la procezo de formiĝo de nacioj, kaj la implikiĝo de tiuj junaj nacioj kune kun la jam establitaj en aferoj de komuna intereso; la sekvanta forta kresko de la kunlaboro inter ĝis tiam izolitaj kaj interkverelantaj popoloj kaj grupoj en internaciaj entreprenoj pri scienco, klerigo, juro, ekonomio kaj kulturo; la kreskado de senprecedence granda nombro de internaciaj humanecaj organizaĵoj dum la pasintaj jardekoj; la disvastiĝo de virinaj kaj junularaj movadoj postulantaj la ĉesigon de milito; kaj la spontanea ekesto de vastiĝantaj retoj de interligoj inter simplaj homoj, kiuj serĉas interkompreniĝon pere de persona interkomunikado.

La scienca kaj teknika progreso en tiu ĉi eksterordinare benita jarcento aŭspicias pri forta impeto al la socia disvolviĝo de nia planedo kaj indikas la rimedojn, per kiuj la praktikaj problemoj de la homaro povas esti solvitaj. Ili fakte provizas la rimedojn por majstri la multifacetan vivon de unuiĝinta mondo. Sed ankoraŭ ekzistas baroj. Duboj, miskomprenoj, antaŭjuĝoj, suspektemo kaj miopecaj meminteresoj turmentas naciojn kaj popolojn en iliaj interrilatoj.

Instigitaj de profunde sentata spirita kaj morala devo, ni volas atentigi vin en tiu ĉi favora tempo pri la profundaj ekkonoj, kiujn Bahá'u'lláh, la Fondinto de la Bahaa Kredo, kies **Sindikoj** ni estas, komunikis unue antaŭ pli ol unu jarcento al la regantoj de la homaro.

“La ventoj de malespero“, skribis Bahá’u’lláh, “blovas el ĉiu direkto, kaj la malpaco, kiu fendas kaj turmentas la homan rason, kreskadas de tago al tago. La signoj de minacaj skuoj kaj kaoso nun estas klare videblaj, des pli ke la nuna ordo aspektas mizere malperfekta.“ La komuna sperto de la homaro profunde confirmis tiun ĉi profetan prijuĝon. La mankoj en la aktuala ordo evidentiĝas en la nekapablo de la suverenaj ŝtatoj organizitaj en Unuiĝintaj Nacioj ekzorci la timigan fantomon de la milito, la minacanta kolapso de la internacia ekonomia ordo, la disvastiĝo de anarkio kaj terorismo kaj la nemezureblaj suferoj, kiujn tiuj ĉi kaj aliaj plagoj kaŭzas al multaj milionoj da homoj. Verdire, agresemo kaj konflikto tiagrade fariĝis karakterizaj trajtoj de niaj sociaj, ekonomiaj kaj religiaj sistemoj, ke multaj homoj estis kondukitaj al la konvinkiĝo, ke tia konduto estas ennaskita en la homa naturo kaj tial neelradikebla.

El la fiksiĝo de tiu ĉi opinio rezultis paraliza kontraŭdiro en la homaj aferoj. Unuflanke, homoj el ĉiuj nacioj deklaras ne nur sian pretecon, sed eĉ sian sopiron al paco kaj harmonio, al ĉesigo de la turmentaj ĉagrenoj, kiuj maltrankviligas ilian ĉiutagan vivon. Aliflanke, senkritika konsento estas donita al la tezo, ke homoj estas neŝanĝeble egoismaj kaj agresemaj kaj tial nekapablaj starigi socian ordon samtempe progresan kaj pacan, dinamikan kaj harmonian — ordon, kiu donas liberecon al individua kreemo kaj iniciato, sed baziĝas sur kunlaboro kaj reciprokeco.

Dum la neceso de paco fariĝas pli kaj pli urĝa, tiu ĉi fundamenta kontraŭdiro, kiu malebligas ĝian realigon, necesigas skrupulan ekzamenadon de la hipotezoj, sur kiuj laŭ ĝenerala konvinko la historia dilemo de la homaro estas bazita. Senpasia esploro evidentigas, ke tiaj opinioj ne nur ne spegulas la veran karakteron de la homo, sed eĉ prezentas distordan bildon de la homa spirito. Kontentigo pri tiu ĉi punkto ebligas al ĉiuj homoj liberigi konstruajn sociajn fortojn, ĉar tiuj konformas al la homa naturo kaj akcelos harmonion kaj kunagadon anstataŭ milito kaj malpaco.

Elekti tian kurson ne signifas malkonfesi la pasintecon de la homaro, sed kompreni ĝin. La Bahaa Kredo konsideras la nuntempan konfuzon en la mondo kaj la fatalan staton de la homaj aferoj kiel naturan fazon en organika procezo kondukanta fine kaj nerezisteble al la unuigo de la homa raso en ununura socia ordo, kies limoj estas tiuj de nia planedo. La homaro, kiel difinita unueca organismo, transpaŝis evolutivecojn analogajn al la aĝoj de bebeco kaj infaneco en la vivoj de ĝiaj unuopaj membroj kaj nun troviĝas kulmine de sia impetema junaĝo proksimiĝante al sia delonge atendata aĝo de matureco.

Honesta rekono, ke antaŭjuĝoj, milito kaj ekspluatado estis la esprimo de ne-maturaj ŝtupoj en longdaŭra historia procezo kaj ke la homaro nuntempe travivas la neeviteblan tumulton, kiu karakterizas ĝian kolektivitan transiron en la aĝon de matureco, ne estas kialo por malespero, sed antaŭkondiĉo por la giganta entreprenado, konstrui pacan mondon. Ke tia entreprenado estas ebla, ke la necesaj konstruaj fortoj fakte ekzistas, ke unuigaj sociaj strukturoj povas esti starigitaj, tio estas la tezoj, pri kies ekzamenado ni urĝe petas vin.

Kiajn ajn suferojn kaj tumultojn la venontaj jaroj alportu, kiel ajn malhelaj estu la cirkonstancoj de la tujproksima futuro — la Bahaa komunumo kredas, ke la homaro povas alfronti tiun ĉi severan juĝon kun fido je ĝia fina rezulto. Anstataŭ signali la finon de civilizacio, la revoluciaj ŝanĝoj, al kiuj la homaro estas pelata pli kaj pli rapide, utilos por liberigi “la potencialon imanentan en la rango de la homo” kaj evidentiĝi “la plenan mezuron de lia destino surtera, la ennaskitan grandiozon de lia realo.”

I

La talentoj, kiuj distingas la homan rason disde ĉiuj aliaj vivospecoj, sumiĝas je tio, kio estas konata kiel la homa spirito; la racio estas ĝia esenca kvalito. Tiuj talentoj ebligis al la homaro konstrui civilizaciojn kaj prosperi materie. Sed tiaj atingoj solaj neniam kontentigis la homan spiriton, kies mistera naturo inklinigas ĝin al transcendo, strebado al nevidebla sfero, al la fina realeco, la nesciebla esenco de esencoj nomita Dio. La religioj, alportitaj al la homaro de sinsekvo de spirita lumiloj, formis la ĉefan ligilon inter la homaro kaj tiu fina realeco, kaj ili stimulis kaj fajnigis la kapablon de la homaro, akiri spiritan sukceson kune kun socia progreso.

Neniu serioza klopodo pri ordigo de la homaj aferoj, pri atingo de monda paco, povas ignori religion. Ĝia perceptado kaj praktikado fare de la homo formas grandskale la teksaĵon de la historio. Eminentaj historiistoj priskribis la religion kiel “kapablon de la homa naturo”. Ke la degenero de tiu kapablo konsiderinde kontribuis al la konfuzo en la socio kaj al la konfliktoj en kaj inter la homoj, ne povas esti kontestata. Sed objektiva observanto same ne povas kontesti la fortan influon de religio sur la esencajn esprimoformojn de civilizacio. Krom tio, ĝian nepran neceson por la socia ordo pruvis ĝia rekta efiko al juro kaj moralo.

Skribante pri religio kiel socia forto, Bahá'u'lláh diris: “Religio estas la plej grava rimedo por la starigo de ordo en la mondo kaj por la paca kontentigo de ĉiuj, kiuj loĝas en ĝi.” Rilate al la eklipso aŭ kadukiĝo de religio, li skribis: “Se malheliĝus la lampo de religio, la sekvoj estus kaoso kaj konfuzo, kaj la lumoj de honesteco kaj justeco, de trankvilo kaj paco ĉesus brili.” Elnombrante tiajn konsekvencojn, la Bahaa skribo atentigas, ke “la perversiĝo de la homa naturo, la dekadenco de la homa konduto, la degeneriĝo kaj disfalo de homaj institucioj malkaŝiĝas en tiaj cirkonstancoj sub ĝiaj plej aĉaj kaj abomenaj aspektoj. La homa karaktero perdas sian dignon, ĉiu fido estas ŝancelita, la nervoj de disciplino malstreĉiĝas, la voĉo de la homa konscienco estas silentigata, la sento de deco kaj honto paliĝas, konceptoj de devo, solidareco, reciprokeco kaj lojaleco estas tordataj, kaj la sento mem de pacemo, ĝojo kaj espero iom post iom estingiĝas.”

Se do la homaro alvenis al punkto de paraliza konflikto, ĝi devas rigardi sin mem, sian propran neglektemon, la logajn voĉojn, kiujn ĝi aŭskultis, por trovi la fonton de la miskomprenoj kaj konfuziĝo praktikitaj en la nomo de religio. Tiuj, kiuj blin-

de kaj egoisme gluiĝis je siaj apartaj ortodoksismoj kaj kredigis al siaj adeptoj erarajn kaj kontraŭdirajn interpretaĵojn pri la eldiroj de la Profetoj de Dio, portas pezan respondecon por tiu ĉi konfuzo — konfuzo ĉarpentita el la artefaritaj bariloj starigitaj inter kredo kaj racio, scienco kaj religio. Ĉar ĉe objektiva ekzameno de la faktaj eldiroj de la Fondintoj de la grandaj religioj kaj de la cirkonstancoj, en kiuj ili devis plenumi sian mision, troviĝas nenio, kio apogus la disputojn kaj antaŭjuĝojn, kiuj perturbas la religiajn komunumojn kaj tial ĉiujn homajn aferojn.

La instruo, ke ni traktu aliajn kiel ni mem ŝatus esti traktataj — etika principo, kiu varie ripetiĝas en ĉiuj grandaj religioj — donas forton al la ĉi-supra observo en du rilatoj: ĝi resumas la moralan sintenon, la pacigan aspekton, kiu etendiĝas tra tiuj ĉi religioj sendepende de la loko aŭ tempo de ilia ekesto; ĝi krome reliefigas aspekton de unueco, kiu estas ilia esenca virto — virto, kiun la homaro en sia senkohereca bildo pri historio fiaskis rekoni.

Se la homaro estus vidinta la Edukantojn de sia komuna infanaĝo en ilia vera karaktero, nome kiel perantojn de unusama civiliza procezo, tiam ĝi gajnus netakseble pli grandan utilon en la akumula efiko de iliaj sinsekvaj misioj. Sed, bedaŭrinde, ĝi malsukcesis en tio.

La reviviĝo de fanatika religia pasio en multaj landoj povas esti konsiderata nur kiel agonio barakto. La karaktero de la perfortaĵoj kaj detruaj agoj ĝin akompanantaj atestas ĝian spiritan bankroton. Fakte, unu el la plej strangaj kaj malĝojigaj faktoj de la nuntempa eksplodiĝo de religia fanatikismo estas la grado, ĝis kiu, en ĉiu kazo, ĝi subfosas ne nur la spiritajn valorojn, kiuj kondukas al la unueco de la homaro, sed ankaŭ tiujn unikajn moralajn venkojn, kiujn perbatalis la religio, kies servanto ĝi ŝajnis esti.

Kia ajn esenca forto la religio estis en la historio de la homaro kaj kiel ajn drama meca la nuntempa reviviĝo de la militema religia fanatikeco estas — religio kaj religiaj institucioj jam de multaj jardekoj estas konsiderataj de kreskanta nombro da homoj kiel sensignifaj por la ĉefaj problemoj kaj afliktoj de la moderna mondo. Anstataŭe, ili aŭ sin turnis al la hedonisma alstrebado de materia kontentigo aŭ sekvas memfaritajn ideologiojn elpensitajn por liberigi la socion el la evidentaj malbonoj, sub kiuj ĝi suferas. Tro multaj el tiuj ideologioj, bedaŭrinde, anstataŭ akcepti la koncepton de la unueco de la homaro kaj fortigi la harmonion inter diversaj popoloj, havis la tendencojn, diecigi la ŝtaton, submeti la tutan homaron al unu nacio, raso aŭ klaso, subpremi ĉian diskuton kaj interŝangon de ideoj, aŭ senindulge elmeti milionojn da malsatantoj al merkataj mekanismoj, kiuj tro evidente pliakrigas la mizeron de la plimulto de la homaro, samtempe ebligante al malgrandaj grupoj vivon en abundo, pri kiu niaj praavoj apenaŭ povis revii.

Kiel tragikaj estas la rezultoj de la kvazaŭreligioj elpensitaj de la saĝemuloj de nia epoko! El la ĝisfunda seniluziiĝo de tutaj enloĝantaroj, kiuj estis instruitaj kulti ĉe iliaj altaroj, povas esti derivita la nerefutebla verdikto de la historio pri ilia valoro. La

fruktoj de tiuj doktrinoj — post jardekoj de pli kaj pli senlima praktikado de potenco fare de tiuj, kiuj ŝuldas al ili sian promocion en homaj aferoj — estas la sociaj kaj ekonomiaj malsanoj, kiuj plagas ĉiun regionon de nia mondo en la finaj jaroj de la dudeka jarcento. Ĉiuj ĉi tiuj eksteraj afliktoj radikas en la spirita damaĝo, spegulita en la apatio, kiu ekposedis la amason de la popoloj de ĉiuj nacioj, kaj en la estingiĝo de la espero en la koroj de elrabitaj kaj timoplenaj milionoj.

Venis la tempo, ke tiuj, kiuj predikas la dogmojn de materialismo — ĉu en oriento aŭ okcidento, ĉu en kapitalismo aŭ socialismo — devas fari sian raporton pri la morala gvido, kiun ili ŝajnigis doni. Kie estas la “nova mondo” promesita de tiuj ideologioj? Kie estas la internacia paco, por kies idealoj ili proklamis sian sindonon? Kie estas la breĉaj trarompoj en novajn sferojn de kulturaj atingoj, faritaj per la glorigo de tiu raso, de jena nacio aŭ de iu difinita klaso? Kial la plejmulto de la popoloj de la tero pli kaj pli profundiĝas en malsaton kaj mizeron, kiam samtempe la nunaj arbitraciantoj en homaj aferoj disponas pri riĉaĵoj, pri kiuj la faraonoj kaj cezaroj aŭ eĉ la imperialismaj potencoj de la 19a jarcento ne povis revii?

Estas precipe en la glorigo de la strebo al materiaj riĉaĵoj — samtempe la prakauzo kaj la komuna trajto de ĉiuj tiaj ideologioj — kie troviĝas la radikoj, el kiuj kreskas la malvero, ke homoj estas neŝangeble egoismaj kaj agresemaj. Ĝuste ĉi tie la tereno devas esti ebenigita por la konstruado de nova mondo taŭga por niaj postuloj.

Ke materialismaj idealoj, kiel montras la sperto, malsukcesis kontentigi la bezonojn de la homaro, kondukas al la honesta rekono, ke necesas nova energia fortostreĉo cele al solvo de la vivodecidaj problemoj de nia planedo. La netolereblaj cirkonstancoj regantaj en la socio atestas pri komuna malsukceso de ĉiuj — fakto, kiu tendencas plifortigi la **abatisojn** je ĉiu flanko anstataŭ malkonstrui ilin. Estas tute klare, ke urĝe necesas komuna kuraca fortostreĉo. Antaŭ ĉio, tio estas afero de sinteno. Ĉu la homaro daŭrigos sian obstinecon alkroĉante sin al eluzitaj konceptoj kaj sentaŭgaj dogmoj? Aŭ ĉu ĝiaj gvidantoj, senkonsidere al ideologio, elpaŝos kaj, kun decida volo, interkonsiliĝos en komuna serĉo de taŭgaj solvoj?

Tiuj, kiuj zorgas pri la futuro de la homa raso, pripensu tiun ĉi konsilon: “Kiam delonge flegataj idealoj kaj de pratempoj honorataj institucioj, kiam sociaj principoj kaj religiaj formuloj ĉesis stimuli la bonfarton de la tuta homa komunumo, kiam ili ne plu servas la bezonojn de daŭre evoluanta homaro, tiam ili estu forbalaotaj kaj forĵetotaj en la rubujon de eluzitaj kaj forgesitaj doktrinoj. Kiel, en mondo submetita al la eterna leĝo de ŝanĝiĝo kaj kadukiĝo, ili povus esti indulgataj de degenero, kiu nepre trafos ĉiun homan institucion? Ĉar la juraj normoj, politikaj kaj ekonomiaj teorioj devas nur protekti la interesojn de la homaro kiel tuto, kaj la homaro ne devas esti krumumita pro la sendifekta konservado de iu leĝo aŭ doktrino.”

II

La proskribo de atomaj armiloj, la malpermeso de aplikado de venena gaso aŭ la interdikto de bakteria milito ne forigos la fundamentajn kaŭzojn de milito. Kiel ajn gravaj tiaj praktikaj paŝoj evidente estas kiel elementoj de interpaciĝo, ili per si mem estas tamen tro supraĵaj por havi daŭran influon. La homoj estas sufiĉe inventemaj en la elpensado de novaj militformoj kaj en la utiligo de nutraĵoj, krudmaterialo, financoj, industrifortoj, ideologio kaj terorismo por renversi unu la alian en senfina strebo al supereco kaj povo. La totala diserigo de la homaj aferoj ankaŭ ne estas kuracebla per reguligo de apartaj konfliktoj aŭ malkonsentoj inter unuopaj nacioj. Vere universala kadro devas esti akceptita.

Certe, al naciaj gvidantoj ne mankas la konscio pri la mondskala karaktero de la problemo mem evidenta en la kreskantaj konfliktoj, kiujn ili ĉiutage devas fronti. Kaj ekzistas la sennombraj studoj kaj solvopropoj fare de multaj interesitaj kaj kleraj grupoj kaj de la instancoj de Unuiĝintaj Nacioj, kiuj ekskludas ĉian eblecon, esti neinformita pri la defiaj bezonoj plenumendaj. Tamen, ekzistas paralizo de volo; kaj tiu ĉi devas esti zorge analizata kaj decide kuracita. Tiu ĉi paralizeco radikas — kiel ni konstatis — en la profunda konvinko pri la neevitebla malpacemo de la homoj, kio kondukis al la malemo, koncedi la submeton de naciaj memintereso sub la postulojn de la monda ordo, kaj al la malinklino, kuraĝe fronti la gravegajn konsekvencojn de la starigo de unuigita tutmonda aŭtoritato. Ĝi ankaŭ fontas el la nekapablo de grandskale sensciaj kaj subpremataj amasoj, klare esprimi sian sopiron al nova ordo, en kiu ili povos vivi en paco, harmonio kaj bonstato kun la tuta homaro.

La eksperimentaj paŝoj direkte al monda ordo, precipe de post la Dua Mondmilito, donas esperigajn signojn. La kreskanta tendenco de grupoj de nacioj al la formigo de rilatoj, kiuj ebligas al ili kunlabori en aferoj de komuna intereso, indikas, ke fine ĉiuj nacioj povas venki tiun ĉi paralizon. La Asocio de Sudorientaj Aziaj Nacioj, la Karibia Komunaĵo kaj Komuna Merkato, la Centramerika Komuna Merkato, la Konsilio por Reciproka Ekonomia Helpo, la Eŭropaj Komunaĵoj, la Ligo de Arabaj Ŝtatoj, la Organizaĵo por Afrika Unueco, la Organizaĵo de Amerikaj Ŝtatoj, la Sudpacifika Forumo — ĉiuj komunaj klopodoj reprezentitaj de tiaj organizaĵoj preparas la vojon al mondordo.

La kreskanta atento fokusita al kelkaj el la plej profunde radikantaj problemoj de nia planedo estas plia esperiga signo. Spite al la evidentaj malperfektecoj de Unuiĝintaj Nacioj, la kvardeko da deklarioj kaj konvencioj akceptitaj de tiu ĉi organizaĵo, eĉ kiam registaroj ne estis tre entuziasmaj en sia sindevigo, donis al ordinaraj homoj senton pri nova vivimpulso. La Universala Deklaracio pri la Homaj Rajtoj, la Konvencio pri Prevento kaj Puno de la Krime de Genocido kaj la similaj rimedoj por malebligi ĉiajn formojn de diskriminacio pro raso, sekso aŭ religia kredo; respekti la rajtojn de infanoj; protekti ĉiujn personojn kontraŭ torturo; elradiki malsaton kaj

subnutritecon; utiligi sciencan kaj teknikan progreson favore al paco kaj bonstatigo de la homaro — ĉiuj ĉi tiuj entreprenoj, se kuraĝe realigataj kaj plilarĝigataj, venigos la tagon, kiam la fantomo de milito perdis sian povon regi la internaciajn rilatojn. Ne estas necese emfazi la gravecon de la temoj pritraktitaj de tiuj deklarioj kaj konvencioj. Tamen, kelkaj el tiuj temoj pro sia rekta influo al la starigo de mondpaco meritas aldonan komenton.

Rasismo, unu el la plej ruinigaj kaj obstinaj malbonoj, estas ĉefa barilo kontraŭ la paco. Ĝia praktiko reprezentas ofendon al la homa digno tro kruela por esti subtenata sub iu ajn preteksto. La rasismo prokrastas la disvolviĝon de la senlimaj kapabloj de siaj viktimoj, koruptas siajn praktikantojn kaj malebligas homan progreson. La agnosko de la unueco de la homaro, efektivigota pere de taŭgaj juraj paŝoj, devas esti universale apogata, se oni volas solvi tiun ĉi problemon.

La troa malegaleco inter riĉuloj kaj malriĉuloj, kiu estas fonto de akuta suferado, konservas la mondon en stato de nestabileco, kvazaŭ ĉe la sojlo al milito. Malmultaj socioj pritraktis tiun ĉi situacion efike. La solvo postulas kombinitan aplikon de spiritaj, moralaj kaj praktikaj rimedoj. Nova rigardo al tiu ĉi problemo estas necesa, akompanata de konsultado ĉe ekspertoj el larĝa spektro de fakoj, libera je ekonomia kaj ideologia polemiko kaj inkluzivanta la homojn rekte koncernatajn en la decidoj urĝe farendaj. Temas pri problemo, kiu estas ligita ne nur kun la neceso ĉesigi ekstreman riĉecon aŭ malriĉecon, sed ankaŭ kun tiuj spiritaj veroj, kies kompreno povas esti tigi novan universalisman sintenon. La fortikigo de tia sinteno estas en si mem unu el la ĉefaj partoj de la solvo.

Senbrida naciismo, distinge de sana kaj legitima patriotismo, devas cedi al pli larĝa lojaleco, al la amo al la homaro kiel tuto. Bahá'u'lláh deklaris: “La tero estas nur unu lando, kaj la homaro estas ĝiaj civitanoj.” La koncepto de mondcivitaneco estas rekta rezulto de la ŝrumpado de la mondo, dank’ al scienca progreso, en ununuran najbarecon kaj de la nedisputebla interdependeco de la nacioj. Amo al ĉiuj popoloj de la mondo ne ekskludas amon al la propra lando. En mondskala socio la avantaĝo de parto estas plej bone certigita per progresigo de la avantaĝo de la tuto. Nunaj internaciaj aktivecoj en diversaj kampoj, kiuj kontribuas al reciproka simpatio kaj sento de solidareco inter la popoloj, bezonas vastan pliigon.

Religia kverelado estis, tra la tuta historio, kaŭzo de sennombraj militoj kaj konfliktoj, ĉefa malhelpilo al progreso, kaj ĝi ĉiam pli fariĝas naŭzaĵo por homoj el ĉiaj kredoj kaj por nekredantoj. La anoj de ĉiuj religioj devas akcepti fronti la fundamentajn demandojn, kiujn tiu ĉi malpaco starigas, kaj trovi klarajn respondojn. Kiel solviĝu la diferencoj inter ili en teorio kaj en praktiko? La religiaj gvidantoj de la homaro estas konfrontitaj kun la defio, konsideri, kun koroj plenaj de la spirito de kompatato kaj deziro al la vero, la mizeron de la homaro kaj demandi sin, ĉu ne eblas, en humileco antaŭ ilia Ĉionpova Kreinto, submergi siajn teologiajn diferencojn en grandanima spirito de reciproka indulgo, kio permesos al ili kunagadi por la progresigo de homa interkompreniĝo kaj paco.

La emancipiĝo de la virino, atingo de plena samrajteco inter la seksoj, estas unu el la plej gravaj, kvankam malpli agnoskitaj, antaŭkondiĉoj por la paco. La rifuzo de tiu egaleco estas maljustaĵo kontraŭ unu duono de la homaro kaj estigas en viroj malutilajn sintenojn kaj kutimojn, kiuj estas portataj el la familio al la laborloko, en la politikan vivon kaj fine en la internaciajn rilatojn. Ekzistas neniam kialoj, nek moralaj, nek praktikaj aŭ biologiaj, kiuj povus pravigi tian rifuzon. Nur kiam la virinoj estos akceptitaj kiel plenrajtaj partneroj en ĉiuj kampoj de homa aktiveco, kreiĝos morala kaj psikologia klimato, en kiu internacia paco povas kreskadi.

Universala edukado, en kies servo staras jam armeo da sindediĉaj homoj el ĉiuj kredoj kaj nacioj, bezonas la plej grandan subtenon, kiun la registaroj de la mondo povas provizi. Ĉar nescio estas sendube la ĉefa kaŭzo de dekadenco kaj pere de popoloj kaj de pludaŭro de antaŭjuĝoj. Neniu nacio akiros sukceson, se ĝiaj civitanoj ne ricevas edukon. Manko de rimedoj limigas la eblecon de multaj nacioj plenumi tiun ĉi bezonon kaj devigas al starigo de prioritatoj. La koncernaj decidohavaj instancoj agas saĝe, se ili donas ĉefan prioritaton al la edukado de virinoj kaj knabinoj, ĉar ĝuste pere de kleraj patrinoj klereco povas disvastiĝi plej efike tra la socio. En akordo kun la postuloj de nia epoko, la instruado de la koncepto de mondcivitaneco devus esti konsiderata ankaŭ kiel elemento de la regula edukado de ĉiu infano.

Fundamenta manko de interkomunikado inter popoloj serioze subfosas la strebon al monda paco. Adopto de internacia helplingvo konsiderinde kontribuos al la solvo de tiu ĉi problemoj kaj postulas urĝegan priatenton.

Du ĉefaj punktoj devas esti emfazitaj en tiu ĉi kunteksto. Unu estas, ke la ĉesigo de milito ne simple estas afero de subskribo de traktatoj kaj protokoloj; ĝi estas kompleksa tasko, kiu necesigas novan nivelon de reciprokaj sindevigoj por solvi problemojn, kiuj kutime ne estas rilatigitaj al la klopodoj pri paco. Bazita sole sur politikaj interkonsentoj, la ideo de kolektiva sekureco estas ĥimero. La alia punkto estas, ke la ĉefa defio en la traktado de problemoj de paco estas levi la debaton al la nivelo de principoj kaj ne resti ĉe pura pragmatismo. Ĉar, esence, paco ekfloras el interna stato subtenata de spirita aŭ morala sinteno, kaj estas ĉefe pere de veko de tiu ĉi sinteno, ke eblas trovi daŭrajn solvojn.

Ekzistas spiritaj principoj, aŭ — kiel aliaj ŝatas diri — homaj valoroj, per kiuj eblas trovi solvojn por kiu ajn socia problemoj. Ĉiu bonintenca grupo povas ĝenerale elpensi praktikajn solvojn por siaj problemoj, sed bonaj intencoj kaj praktikaj scioj kutime ne sufiĉas. La esenca merito de spiritaj principoj estas, ke ili ne nur ofertas perspektivon harmoniantan kun la vera karaktero de la homo, sed ankaŭ peras sintenon, impeton, volon kaj aspiron, kiuj faciligas la malkovron kaj plenumon de praktikaj paŝoj. La ŝtatestroj kaj ĉiuj aŭtoritatuloj agas taŭge en siaj klopodoj al la solvo de la problemoj, se ili unue identigus la koncernajn principojn kaj akceptus ilin kiel gvidilojn.

III

La ĉefa demando solvenda estas, kiel la hodiaŭa mondo kun ĝiaj rigidaj konfliktostrukturoj povus ŝanĝiĝi en mondon, kie regas harmonio kaj kunlaboremo.

Tutmonda ordo povas esti fondita nur sur neskiebla konscio pri la unueco de la homaro, spirita vero konfirmita de ĉiuj homsciencoj. Antropologio, fiziologio kaj psikologio rekonas nur unu homan specion, kvankam senfine varian laŭ la malĉefaj fenomenoj de la vivo. La agnosko de tiu ĉi vero postulas forlason de antaŭjuĝoj — antaŭjuĝoj de ĉiuj specoj — pri raso, klaso, haŭtkoloro, kredo, nacio, sekso, grado de materia civilizacio, ĉio, kio ebligas al la homoj konsideri sin superaj al aliaj.

Rekono de la unueco de la homaro estas la ĉefa baza kondiĉo por la reordigo kaj administrado de la mondo kiel unu lando, kiel la hejmo de la homaro. Universala akcepto de tiu ĉi spirita principo estas esenca por ĉiu sukcesa klopodo pri starigo de mondpaĉo. Tial tiu ĉi principo devus esti proklamata mondscale, instruata en lernejoj kaj klariĝata en ĉiu nacio kiel preparo por la organika ŝanĝo en la socio, kiun ĝi implicas.

El la Bahaa vidpunkto, la agnosko de la unueco de la homaro “postulas ne malpli ol la rekonstruon kaj la malarmadon de la tuta civilizita mondo — mondo, organike unuiĝinta en ĉiuj esencaj aspektoj de ĝia vivo, ĝia politika funkciado, ĝia spirita aspiro, ĝiaj komerco kaj financo, ĝiaj skribo kaj lingvo, kaj tamen senlima en la diverseco de la naciaj karakterizaĵoj de ĝiaj federaj unuoj.”

En siaj klarigoj pri la implicoj de tiu ĉi centra principo, Shoghi Effendi, la Gardanto de la Bahaa Kredo, komentis en la jaro 1931: “Neniel celante la renverson de la ekzistantaj fundamentoj de la socio, ĝi klopodas plilarĝigi ĝian bazon, aliformi ĝiajn instituciojn en maniero harmonianta kun la bezonoj de konstante ŝanĝiĝanta mondo. Ĝi ne povas konflikti kun legitimaj fidelecoj, nek subfosi fundamentajn lojalecojn. Ĝia intenco estas nek estingi la flamon de sana kaj inteligenta patriotismo en la koro de la homoj, nek aboli la principon de nacia aŭtonomio, tiel esenca, kiam la malbonoj de troa centralismo devas esti evitataj. Ĝi nek ignoras la diversecon de genta deveno, de klimato, de historio, de lingvo kaj tradicio, de pensado kaj kutimoj, kiuj diferencigas la popolojn kaj naciojn de la mondo, nek ĝi klopodas subpremi ĝin. Ĝi alvokas al pli granda lojaleco, al pli forta aspiro, ol iu ajn alia, kiu iam animinstigis la homan mondon. Ĝi insistas pri la submeto de naciaj impulsoj kaj interesoj sub la neprajn bezonojn de unuigita mondo. Ĝi rifuzas unuflanke la troan centralismon kaj aliflanke malaprobas ĉiujn strebojn al unuformeco. Ĝia moto estas unueco en diverseco.”

La atingo de tiaj celoj necesigas diversajn ŝtupojn en la ĝustigo de naciaj politikaj sintenoj, kiuj nuntempe tuŝas anarkion pro manko de klare difinitaj leĝoj aŭ ĝenerale akceptitaj kaj efektivegeblaj principoj por reguligo de la interpopolaj rilatoj. La Ligo de Nacioj, la Unuiĝintaj Nacioj kaj la multaj organizaĵoj kaj konvencioj kreitaj de ili sendube kontribuis al mildigo de kelkaj negativaj konsekvencoj de internaciaj kon-

fliktoj, sed ili montriĝis netaŭgaj malebligi militon. Fakte ekflamis dekoj da militoj de post la Dua Mondmilito, kaj kelkaj ankoraŭ furiozas.

La ĉefaj aspektoj de tiu ĉi problemo ekaperis jam en la 19a jarcento, kiam Bahá'u'lláh unuafoje prezentis siajn proponojn por starigo de mondpaco. La principon de kolektiva sekureco li klarigis en siaj mesaĝoj al la regantoj de la mondo. Shoghi Effendi komentis liajn proponojn jenamaniere: “Kion alian tiuj ĉi gravaj vortoj povas signifi ol la atentigo pri la neevitebla limigo de absoluta nacia suvereneco, kiel nepre necesa unua paŝo al la konstruo de la estonta Federacio de ĉiuj nacioj de la mondo? La formo de monda Superŝtato devas esti disvolvita, je kies favoro ĉiuj nacioj de la mondo volonte cedos ĉian pretendon por militi, certajn rajtojn starigi impostojn kaj ĉiujn rajtojn teni armadon, krom tiuj por sekurigi internan ordon en siaj teritorioj. Tia ŝtato devos enteni en siaj kadroj Internacian Ekzekutivon adekvatan por trudi plejsuperan kaj nerezisteblan aŭtoritatecon al ĉiu kontraŭstarema membro de la komunumo; Mondparlamenton, kies membroj estos elektitaj de la popoloj de ties landoj kaj kies elekto estos konfirmita de la respektivaj registaroj; kaj Plejsuperan Kortumon, kies juĝdecidoj havos ligan validecon, eĉ en tiuj kazoj kiam la partioj ne konsentis libervole submeti sian kazon al ĝia jurisdikcio.

Tutmonda komunumo, en kiu ĉiuj ekonomiaj bariloj estos por ĉiam disrompitaj kaj la interdependeco de kapitalo kaj laboro definitive rekonita; en kiu la brukriado de religia fanatikeco kaj disputado estos por ĉiam silentigita; en kiu la flamo de rasa malamikeco estos fine estingita; en kiu unu sola kodo de internacia juro — rezulto de saĝe pripensataj decidoj de la federaciaj reprezentantoj de la mondo — havos kiel sankcion tujan kaj devigan intervenon de la kunigitaj fortoj de la federaciaj nacioj; kaj fine mondkomunumo, en kiu la furiozo de kaprica kaj militema naciismo estos ŝanĝita en daŭran konscion pri mondĉivitaneco — jen aspektas, en siaj ĉefaj linioj, la Ordo anticipita de Bahá'u'lláh, Ordo konsiderota kiel la plej nobla frukto de malrapide maturiĝanta epoko.”

Pri la efektivigo de tiuj perspektivoj Bahá'u'lláh diris: “Devas veni la tempo, kiam la nepra neceso por okazigo de vasta, ĉioampleksa kunveno de homoj estos universale rekonita. La regantoj kaj reĝoj de la tero nepre devas ĉeesti ĝin, kaj, partoprenante ĝiajn interkonsiliĝojn, ili devas preparoli tiajn vojojn kaj rimedojn, kiuj kondukos al la monda Plejgranda Paco inter la homoj.”

La kuraĝo, la decidemo, la pura motivo, la senegoisma amo de unu popolo al la alia — ĉiuj spiritaj kaj etikaj kvalitoj necesaj por tiu grandega paŝo al paco fokusiĝas en la volo agi. Kaj por vekti la necesan volon, oni devas serioze konsideri la realecon de la homo, nome lian pensadon. Kompreni la gravecon de tiu ĉi potenca realeco signifas samtempe konscii pri la socia neceso efikigi ĝian unikan valoron pere de sincera, senpasia kaj amika interkonsiliĝo kaj agi surbaze de la rezultoj de tiu ĉi procezo. Bahá'u'lláh insiste atentigis pri la alta valoro kaj nepra neceso de interkonsiliĝo por la ordigo de la homaj aferoj. Li diris: “Interkonsiliĝo kreas pli profundan konscion kaj ŝanĝas konjekton en certecon. Ĝi estas brila lumo, kiu en obskura mondo montras la

vojon kaj donas gvidon. Por ĉio ekzistas kaj plu ekzistos nivelo de perfekteco kaj matureco. La matureco de la dono de kompreno manifestiĝas per interkonsiliĝo.” Ĝuste la klopodo atingi pacon pere de la interkonsiliĝa agado, kiun li proponis, povas liberigi tiel sanigan spiriton inter la popoloj de la tero, ke nenia potenco sukcesus kontraŭstari la finan, triumfan rezulton.

Pri la agadmanieroj de tiu ĉi universala kunveno, ‘Abdu’l-Bahá, la filo de Bahá’u’lláh kaj rajtigita interpretanto de liaj instruoj, proponis la jenon: “Ili devos fari el la Movado por Paco temon de ĝenerala interkonsiliĝo, kaj strebi per ĉiuj siaj fortoj starigi Unuiĝon de la nacioj de la mondo. Ili devos fari devigan traktaton kaj interligon, kies kondiĉoj estu saĝaj, nerompeblaj kaj firmaj. Ili devos proklami ĝin al la tuta mondo kaj akiri por ĝi la aprobon de la tuta homa raso. Tiu ĉi supera kaj nobla entrepreno — la vera fonto de paco kaj bonfarto de la tuta mondo — estu konsiderata kiel sankta de ĉiuj, kiuj loĝas surtere. Ĉiuj fortoj de la homaro devas esti mobilizitaj por certigi la stabilecon kaj daŭron de tiu ĉi Plejgranda Interligo. En tiu ĉi universala Pakto, la ekstremoj kaj limoj de ĉiu nacio estu klare fiksitaj, la principoj, sur kiuj baziĝas la interrilatoj de la registaroj, neŝanĝeble difinitaj, kaj ĉiuj internaciaj interkonsentoj kaj sindevigoj certigitaj. Same, la grandeco de la armado de ĉiu registaro estu strikte limigita, ĉar se oni permesus kreskadon de la militpreparoj kaj -fortoj al iu nacio, tio kaŭzus la suspektojn de la aliaj. La fundamenta principo de tiu ĉi solena Pakto devus esti fiksita tiamaniere, ke, se iam iu registaro rompus ian ĝian kondiĉon, ĉiuj registaroj de la mondo devus elpaŝi kaj redukti ĝin al totala submetiĝo — ne, la tuta homa gento devus decidiĝi detrui tiun registaron per ĉiuj disponeblaj fortoj. Se ĉi tiu plej granda el ĉiuj kuraciloj estus aplikita al la malsana korpo de la mondo, ĝi certe resaniĝus de siaj malsanoj kaj eterne restus bonfarta kaj sekura.”

La okazigo de tiu potenca kunveno jam tro prokrastiĝis.

Tutkore ni alvokas la gvidantojn de ĉiuj nacioj eluzi tiun ĉi oportunan horon kaj neŝanceleble elpaŝi por aranĝi tiun ĉi universalan kunvenon. Ĉiuj fortoj de la historio urĝas la homan rason al tiu ĉi ago, kiu markos por ĉiam la aŭroron de ĝia delonge atendata matureco.

Ĉu ne Unuiĝintaj Nacioj, kun plena apogo de siaj ŝtatoj-membroj, strebu al la altaj celoj de tia glora evento?

Ke viroj kaj virinoj, gejunuloj kaj infanoj ĉie rekonu la eternan valoron de tiu necesega ago por ĉiuj popoloj kaj levu siajn voĉojn en plena konsento! Vere, estu la nuna generacio tiu, kiu malfermos tiun gloran etapon en la evoluo de la socia vivo sur nia planedo!

IV

La optimismo, kiun ni sentas, fontas el vizio, kiu transpasas la ĉesigon de milito kaj la kreon de instancoj por internacia kunlaboro. Daŭra paco inter la nacioj estas

esenca stadio, sed ne, kiel Bahá'u'lláh konfirmas, la finfina celo en la socia evoluo de la homo. Super la armistico, al kiu la homaro estas perfortigita pro timo de la atoma infero, super la politika paco, pri kiu malvolonte konsentas suspektemaj rivalantaj nacioj, super la pragmataj aranĝoj pri sekureco kaj konekzistado, super la multaj klopodoj de kunlaboro, kiun ebligas tiuj paŝoj, troviĝas la plej alta celo: la unuiĝo de ĉiuj homoj de la mondo en unu universala familio.

Malkonkordo estas danĝero, kiun la nacioj kaj popoloj de la mondo ne povas elteni pli longe; la konsekvencoj estas tro teruraj por kontempladi, tro evidentaj por bezoni iun klarigon. “La bonfarto de la homaro”, skribis Bahá'u'lláh antaŭ pli ol unu jarcento, “ĝia paco kaj sekureco estos neatingeblaj, se ĝia unueco ne estos firme establita.” Observante ke “la tuta homaro ĝemas, sopiregas al gvido al unueco, kaj al la ĉesigo de sia jarcenta martireco”, Shoghi Effendi plu komentis, ke: “Unuiĝo de la tuta homaro estas la karakterizaĵo de la nivelo, al kiu la homa socio nun proksimiĝas. La unueco de la familio, de la tribo, de la civito kaj de la nacio estis sukcese alstrebataj kaj plene atingitaj. Tutmonda unueco estas la celo, al kiu torturita homaro nun aspiras. La konstruado de nacioj atingis sian finon. La anarkio, akompananta la ŝtatan suverenecon, proksimiĝas al kriza kulmino. Mondo maturiĝanta devas seniĝi je tiu fetiĉo, rekoni la unuecon kaj tutecon de la homaj interrilatoj kaj konstrui unufoje por ĉiam la organismon, kiu plej konvene reprezentas tiun ĉi fundamentan principon de ĝia vivo.”

Ĉiuj hodiaŭaj fortoj de ŝanĝiĝo konfirmas tiun ĉi vidpunkton. La pruvoj estas ekkoneblaj je la multaj jam cititaj ekzemploj de favoraj signoj pri mondpaco el la nuntempaj internaciaj movadoj kaj disvolviĝoj. La armeo el viroj kaj virinoj el praktike ĉiu kulturo, raso kaj nacio de la tero, kiuj deĵoras en la diversaj instancoj de Unuiĝintaj Nacioj, reprezentas tutmondan “Civilan Servon”, kies impresaj faroj klare montras la altan gradon de kunlaboro, kiu estas atingebla eĉ en senkuraĝigaj cirkonstancoj. Dezirego al unueco, kvazaŭ spirita printempo, strebas sin esprimi per nenombreblaj internaciaj kongresoj, kiuj kunvenigas homojn el plej diversaj fakoj. Ĝi animas la alvokojn por internaciaj projektoj rilate al infanoj kaj gejunuloj. Fakte ĝi estas la vera fonto de la rimarkinda ekumenisma movado, kiu ŝajne nerezisteble altiras la anojn de historie antagonismaj religioj kaj sektoj unuj al la aliaj. Kune kun la kontraŭa tendenco al milito kaj singlorigo, kiun ĝi senĉese kontraŭbatalas, la impulso al monda paco estas unu el al elstaraj karakterizaĵoj de la vivo sur nia planedo en la finaj jaroj de la 20a jarcento.

La sperto de la Bahaa komunumo povas esti konsiderata kiel ekzemplo por tiu ĉi ampleksiĝanta unueco. Ĝi estas komunumo de ĉirkaŭ tri aŭ kvar milionoj da homoj el multaj nacioj, kulturoj, klasoj kaj kredoj, kiuj engaĝiĝas en plej diversspecaj aktivecoj servantaj al la spirita, sociaj kaj ekonomiaj bezonoj de la popoloj en multaj landoj. Ĝi estas unueca socia organismo, reprezentanta la diversecon de la homa familio, prizorganta siajn aferojn per sistemo de komune akceptitaj principoj de interkonsiliĝo kaj estimanta egale ĉiujn grandajn elverŝojn de la dia gvido en la homa historio. Ĝia

ekzisto estas plua konvinka pruvo por la realigeblo de la vizio de ĝia Fondinto pri unuigita mondo, plua evidentigo, ke la homaro povas vivi kiel universala socio, indiferekte kiuj defioj akompanos ĝian maturiĝon. Se la sperto de la Bahaanoj povas iel kontribui al la fortikigo de la espero pri la unueco de la homa raso, ni volonte ofertas ĝin kiel studindan modelon.

Pripensante la ekstreman gravecon de la tasko, kiu nun defias la tutan mondon, ni klinas niajn kapojn en humileco antaŭ la respektinda majesto de la dia Kreinto, Kiu en Sia senfina amo kreis la homaron el la sama radiko; nobligis la juvelan realecon de la homo; honorigis ĝin per intelekto kaj saĝo, nobleco kaj senmorteco; kaj donis al la homo “la unikan distingon kaj kapablon ekkoni Lin kaj ami Lin”, kapablecon, kiu “devas esti konsiderata kiel la krea impulso kaj la ĉefa celo de la tuta kreado.”

Ni estas firme konvinkitaj, ke ĉiuj homoj estis kreitaj por “antaŭenigi ĉiam progresantan kulturon”; ke “estas maldigne por la homo vivi kiel la bestoj sur la kampo”; ke la virtoj konvenantaj al la homa digno estas fidindeco, indulgemo, karitato, kompatado kaj boneco al ĉiuj homoj. Ni rekonfirmas nian konvinkon, ke “la potencialoj, kiuj respondas al la homa ŝtupo, la plena mezuro de la destino surtere, la ennaskita aparteco de la realo, devas senescepte malkaŝiĝi en tiu ĉi promesita Tago de Dio.” Jen la motivoj por nia neŝancelebla kredo, ke unueco kaj paco estas la atingebla celo, al kiu la homaro strebas.

Dum tio ĉi estas skribata, estas aŭdeblaj la atendoplenaj voĉoj de la Bahaanoj, spite al la persekutoj, kiujn ili ankoraŭ suferas en la lando de la naskiĝo de sia kredo. Per sia ekzemplo de firma espero ili estas atestantoj por la kredo, ke la tuja realigo de tiu jarmila revo pri paco nun estas, kaŭze de la transformaj efikoj de la revelacio de Bahá'u'lláh, ornamita per la potenco de dia aŭtoritato. Tiel ni komunikas al vi ne nur vizion en vortoj: ni citas la potencon de la agoj de kredo kaj sinofero; ni diskonigas la urĝan pledon de niaj samreligianoj ĉie por paco kaj unueco. Ni ligiĝas kun ĉiuj, kiuj estas la viktimoj de agreso, ĉiuj, kiuj sopiras ĉesigon de batalado kaj malkonkordo, ĉiuj, kies sindediĉo je la principoj de paco kaj mondordo akcelas la noblajn celojn, por kiuj la homaro estis kreita de la ĉionama Kreinto.

Sincere dezirante al vi partoprenon en la fervoro de nia espero kaj en la profundeco de nia konfido, ni volas citi la emfazan promeson de Bahá'u'lláh: “Tiuĵ teruraj bataloj, tiuj detruaj militoj ĉesos kaj la ‘Plejgranda Paco’ venos.”

La Universala Domo de Justeco